# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-06 sendita el Budapeŝto la 11an de februaro. Kontrolo el Benino.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Alvoko por la 43a Esperantologia Konferenco

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la **Esperantologia Konferenco 2021**, sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La Konferenco okazos kadre de la Kongreso de 2021 - depende de la cirkonstancoj, aŭ en Belfasto aŭ virtuale. Ĝi pritraktos temon aktualan kaj gravan, kiu ankaŭ tuŝas la formaton de la konferenco mem:

**'Defioj por lingvoj kaj komunikado en mondo virtuale kunligita'**

La konferenca temo rilatas al la nuna situacio de la mondo - t.e. virtualaj versioj de la Universala Kongreso, Esperanto-renkontiĝoj kiuj pli ofte okazas interrete, juna esperantistaro kiu plifortiĝas pro retaj lingvo-kursoj kaj, pli grave, lingvo-uzado kiu ŝanĝiĝas ĉar distanco ne same gravas kiam temas pri ne-vidalvida komunikado. La temo same bonvenigas esploristojn, kiuj analizas ĉeestan komunikadon en mondo ĉiam pli virtuala. La konferenco okazos en tri partoj:

1) dudek-minutaj prezentoj pri referaĵoj ĉirkaŭ la konferenca temo.
2) tri-minutaj prezentoj, surbaze de unu bildo, pri esploroj rilataj al la ĉefa temo aŭ pri Esperantologio pli ĝenerale.
3) rondan tablo, malferma al ĉiuj ĉeestantoj, pri lingvo-uzado, aktivado kaj esplorado dum la kronvirusa pandemio.

**Ni invitas ĉiujn fakulojn - aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn - sendi proponojn pri referaĵoj** (por la unua parto de la konferenco) kaj/aŭ pri mallongaj prezentoj (por la dua parto). La proponoj - enhavantaj inter 150 kaj 200 vortoj - devas esti sendataj, kiel eble plej baldaŭ, al la retadreso de la du organizantoj: guilhermefians@gmail.com kaj oraola@gmail.com. La proponantoj indiku ĉu ili emas prezenti nur ĉeeste, nur virtuale aŭ en ambaŭ okazoj.

La limdato por la proponoj estas la **30-a de aprilo 2021**.

Guilherme Fians kaj Orlando Raola, Organizantoj de EK 2021

## Ertl pri lingvopolitiko en la Eŭropa Unio



Ni kore invitas Vin al la venonta tre interesa kaj aktuala reta prelego de István Ertl (Stefano Ertl), tradukisto ĉe la Eŭropa Revizora Kortumo. Okazos per Zoom la 25-an de februaro 2021 (jaŭde) ekde la 18.30 horo laŭ la mezeŭropa tempo (CET) kaj 17.30 UTC.

**<u>Temo:</u> Lingvopolitikaj evoluoj en la Eŭropa Unio"**

https://zoom.us/j/97152484286?pwd=THYrWnp1NlJJb2ZyZHUxOWR3SUY1Zz09

Meeting ID: 971 5248 4286; Passcode: UP189q

Mesaĝo de la hungara filio de EDE

## Nia komerca faka asocio zomas atenten

La 24an de januaro okazis per Zoom la 4a DK (Dimanĉa Kunveno) de IKEF kun pli ol 40 partoprenantoj el Belgio, Ĉinio, Irano, Kanado, Koreio, Mongolio, Polando, Rusio, Svislando kaj Tanzanio.

La temo de la 4a DK estis "IKEF en Irano". Pri la temo prelegis s-ro Surush Mohammadzadeh, prezidanto de IKEF-Irano. En Irano laboras landa filio de IKEF kun 12 membroj. La filio jam sukcesis komerci pri POS-aparatoj por bankoj. Ĝi produktas esperantaĵojn kaj T-ĉemizojn kun varmarko) 'IKEF-IR / Suruŝ' kune kun barkodo kaj retpaĝo. Ĝi akceptas diverslandajn vojaĝemulojn/komercemulojn kaj dufoje organizis Esperanto-karavanojn el Ĉinio. Nun ili planas konstrui sian oficejon kaj lernejon en la insulo Kish.

Nia sekva regula kunveno, la 5a DK (Dimanĉa Kunveno) okazis la 31an de januaro kun partoprenintoj ĉirkaŭ 30 el Belgio, Bulgario, Ĉinio, Irano, Japanio, Kanado, Kongo, Koreio, Mongolio, Pollando, Svislando, Tanzanio kaj Ukrainio. La temo estis pri "Belaj perlobidoj". Ĉina esperantistino Yu Ximei (Fabina) komercumadas pli ol dudek jarojn en la kampo de perlobidoj kaj ornamaĵoj. Ŝi prelegis pri sia komercumo kaj kompanio "Xiamen Shirley Beads & Accesary Co. Ltd" kiu ekkomercis en 1998. Ankaŭ produktas ili varojn kun Esperanto-signoj kaj simboloj. La kompanio gajnis honorigajn titolojn, kaj konfidon de aĉetantoj kaj kunlaborantoj. Ili jam kunlaboras nun kun Alibaba. Detaloj en la retpaĝo de IKEF.

IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

La 6a DK (Dimanĉa Kunveno) okazis en la 7a de februaro. Lae prezidanto de IKEF-Pollando, s-ro Vojtek Wojciech Mysiara, prelegis pri "IKEF-Pollando" kaj "Bela Juvelo". Li mem produktas juvelaĵojn kaj komercas per ili. La landa filio de IKEF en Pollando fondiĝis ene decembro 2019. La filio nun havas 7 membrojn. Ĝi estas la 18a landa filio de IKEF.

La ĉiusemajnaj DK okazas 12:00-12:40 kaj 12:50-13:30 laŭ UTC – la Grenviĉa horzono. Unu horon poste por CET. Skribu al IKEF por rajti je aliro kaj eble por peti aliĝon al IKEF mem. Bonvenon al niaj renkontiĝoj!

La informoj de IKEF estas legeblaj ĉe:

- Hejmpaĝo https://ikef.info; (moderna, 12-lingva)
- Google-grupo “Komerco”;
- Facebook-paĝoj: “IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio” kaj “Komerco”;
- Facebook-grupoj: “Komerco helpe de Esperanto” kaj “Ekonomia Esperantismo”;
- Wechat-grupoj: “Monda komerco” kaj “Monda turismo”.

Chimedtseren Enkhee, Mongolio, vic-ĝenerala sekretario de IKEF.
<chimedtserenenkhee<ĉe>yahoo.com>

# Tanzanio deziras komerci!

IKEF konas nian landfilion kun nomo:Tanzania Komerco kaj Ekonomio Fakgrupo. Mallonge TKEF.Ĝi havas la saman celon kiel IKEF kaj strebas realigi tiun ĉi tiuni projekton en Tanzanio. Ĝi nur nun komencas agadi.

En 2019 la esperantistoj en Tanzanio akceptis la ideon fondi fakgrupon de IKEF.






Ne pasis longa tempo IKEF reagis al nia mesaĝo kun aprobo. TKEF havas kvin membrojn, kies estraro konsistas el tiuj personoj:

Prezidanto: s-ro Charles Kimweri Hiza (chakhiza951@gmail.com)

Sekretario: s-ro Aloyce Magari (aloyce. demagari@gmail.com)

Vic-sekr: s-ro Mulele Mbassa (mulelembassa@gmail.com)

Membro: s-ino Rehema Mohamed (rmouddy@gmail.com)

Membro: s-ro Maxmilian Madoro (mmadoro02@gmail.com)

TKEF planas kreskigi sian membaron por havi fortan grupon; membreco estos malfermita al ĉiuj esperantistoj en Tanzanio!

Mulele Mbassa

Landa Asocio en Tanzanio ĵus petis aliĝon al UEA. Tra Afriko oni ĉiam ligas Esperanton kun evoluigo kaj edukado. Tial aktivado en IKEF havas grandan sencon en tiu mondparto.

# Novaj rubrikoj por la EKO-komunikoj

Ni anoncas du novajn neregulajn rubriketojn por niaj komunikoj, cele al pli interaktiva dervo. Kandidataj tekstoj bonvenaj, en litertipo Arial, 12-punkta, kun Unikod-kongruaj supersignoj. Ili konformu al la neŭtraleco de UEA. Anonimaj kontribuoj ne estos aperigitaj.

**“EKcito:** Trafaj aforismoj, iel rilataj al la Eo-vivo. Maks 25 vortoj.

**!! EKomentario:** Opiniprezentaj tekstoj, iel rilataj al la Eo-vivo kaj agado. Maks 300 vortoj.

La serio kreas abundon da tekstoj el plej diversaj fontoj. Ege helpus al nia laboro, se aktivuloj kaj asocioj pretigus tekstojn por EKO laŭ la supraj teknikaj normoj, en konvena longo: celo 250-450 vortoj. Ĉiam pensu pri la internacia publiko, kaj zorgu, ke ĉiu necesa informo enestas (dato, horo, organizanto, temo). Laŭeble sendu emblemon de la organizanta grupo aŭ evento. Fotoj ĉiam bonvenas – ekrana kvalito sufiĉas.

========= vortoj: 990 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.


Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

Redaktoroj: Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



ENHAVO

- Esperantologio
- Ertl pri lingvopolitiko
- IKEFsemajne
- IKEF en Tanzanio
- Novaj rubrikoj